

# tempo

tempo 昭和11年6月20日第三種郵便物認可 昭和12年1月15日印刷納本 昭和12年1月25日發行 (毎月1回25日發行) 第26號

Redaktoroj: *Seija Içiki, T. Hattori, K. Kanja, K. Kondo, S.H. Macujama, Y. Nozima, K. Akata, M. Ootani, K. Sisido, S. Toda, K. Uno.*  
Administranto: *S. Nakahara.*

**KYÔTO, 25 JANUARO, 1937.**

Redakcio kaj Administracio: Librejo Kaniya,  
Teramati Ebisugawa, Kyôto, Japanujo  
Internacia poŝt-ĉek-konto, Osaka 23404

ABONPREZO

Jarabono enlanda. . . . . 1.20 jenoj  
Jarabono eksterlanda. . . . 1.50 jenoj  
aŭ 10 respondkuponoj

## Urĝa Propono

Kobajaŝi-Içizo\*

### Meritoj kaj malmeritoj de kapitalismo

Kiel vi jam konas, nun en japanio regas kripla ekonomia prospero kaŭzita de tielnomata municindustrio, sekve nur la koncerna flanko vigliĝas kaj profitas, dum aliaj flankoj de industrio ĝenerale ne profitas kompare tion. Ĉi tiu estas tielsame, kiel en germanio oni laboras per tuta forto en municindustrio kaj sekve la afero por eksterlanda komerco malvigliĝas kaj multe pli malfaciliĝas la kontrolo de moninterŝanĝo, neglate iras la asigna sistemo pro manko de eksportaj varoj, sen limigo de eĉ necesajoj kiel butero kaj fromaĝo.

Ĉu mi ne timu ke ankaŭ nacia ekonomio de nia lando okazigos malbonecan inflacion kaŭzite de ŝtata ŝuldo plimultigita sur jam multa ŝtata ŝuldo pro ŝvelo de municindustrio, se oni lasos ĝian iradon, kaj finfine nevole falus en la kontrolekonomio kiun adaptas jam itatio kaj germanio. "Nu, pripensante pri nuna situacio mi atentis, ke sur stratoj plenas voĉoj silentaj" riĉigi nacion estas tre bone, tamen se komisiite al kapitalistoj, riĉaĵoj ellaboritaj de popolo estos monopolaĵoj de kapitalista klaso kaj laborantoj ne fariĝus feliĉaj kaj riĉaj, kaj sekve plej urĝaj aferoj por ŝtata

progreso estos piedfrakasitaj sub profito de kapitalista klaso.

Prave, oni ne povas nei ke ĝisnuna kapitalisma ekonomia organizo certe havis tian tendencon, tamen mi devas rekoni meritojn de kapitalismo, kiu estas altiginta civilizon ĝis ĝia hodiaŭa nivelo. Ne mortigu ĝiajn bonajn, ne faru malsaĝon dekaki akcelilon por homara feliĉo de kapitalisma ekonomia organizo, pro nekonkreta malamikeco kontraŭ kapitalisma klaso. Mi klare rekoni ke kontrolo ekonomio de ŝtato ne estas favora al prospero de ŝtato kaj vivo de ĝenerala popolo, rigardinte ĉiutagan vivon de popolo de soveto, germanio kaj itatio. Sed kompreneble, se riĉaĵoj kunlaboraĵoj de popolo estos monopolitaj de iuj de kapitalistoj, la riĉiga politiko por la bono de popolo kaj altigo de kulturo preparos naski klasojn kiel en eŭropo kaj usono.

### Japania specialeco kaj propono de nova kapitalismo.

Tial mi jene proponas al vi novan vojiron, konsiderante specialan soci-situacion de nia lando, kiu promesas eblecon de efektivigo, tio estas, la sistemo egaliganta dividon de profito. Ĉiu entrepreno estu administrataj de privata kapitalo, tamen kun limigo de profito kaj ĝia dividendo. Ekzemple,

komunumaj entreprenoj, fervojo, elektro kaj gaso, publikaj entreprenoj de vivasekuro, banko, kreditkompanio, k.t.p. kun dividendo limigita je 7%, 8%, kaj ĝia supera profito estu por la feliĉo de laborantoj kaj ankaŭ por pago al ŝtato. Tiu ĉi estu efektivebla per ŝanĝo de regulo aŭ per speciala leĝdono, kaj plie ankaŭ limigu profiton de kapitalisto, kaj egaligu dividadon per taŭga limigo por fabriklaboruloj kaj por komerca kompanio. Ĉi tiu nova ekonomia strukturo urĝe necesas nor nuna tempo.

Eble iuj demandus al mi "Ĉu ĉiuj kapitalistoj unuanime ne malkonsentas kontraŭ tia projekto?" Mi kredas ke se mia projekto estas la vera vojo al riĉigo de ŝtato kaj la prospero de popolo, neniu japana kapitalisto malkonsentus?

Japana socio posedas specialan karakterizon, kiun ne scias eŭropo kaj ameriko, kio estas tre konvena por krei kaj konstrui novan ekonomian strukturon.

Kio do estas la propra specialeco, kiun imiti ne kapablas eŭropo kaj nur japanio posedas.

Lastatempoj de post kiam en socia stato kaj ekonomia stato de nia lando okazas similaĵoj eŭropaj kaj amerikaj, libroj ankaŭ enportis en nian landon diversajn ideojn, komunisman, faŝisman, kaj ili ne restas kiel ideo mem, sed ili sin prezentis kiel problemoj de efektivigo, ago, oni diskutas pri faligo de plutokration, frakaso de posedaĵoj pli ol miliono da jenoj, por senigo de

malegaleco de riĉo kaj malriĉo k.t.p. Tamen, miaopinie, tiaj postulo, ideo, diskutoj estas rektaj tradukaĵoj de eŭropaĵoj en japanion faritaj senkonsidere specialecon de eŭropo kaj ameriko, kie ili naskiĝis. Abstraktaj diskutoj tute ne estas harmoniaj al speciala stato de japanio.

Ekzemple oni mencias pri pluto-kratio, klasbatalo, tamen en efektiveco en japanio ne sin trovas riĉuloj kiuj meritas la nomon vokitan en eŭropo. Japaniaj riĉuloj sufiĉe riĉaj estas, tamen netiel kompare tian en eŭropo kaj ameriko.

En eŭropo ekzistas certe klasoj kiel en feŭda epoko de japanio kaj ega diferenco inter malriĉo kaj riĉo. Idoj de malalta socitavalo ne povas iri al lernejo pli alta ol meza, do eduko estas ankaŭ por ili limigita. Idoj de kapitalisto fariĝas kapitalistoj, idoj de fabriklaboristo fariĝas laboristoj. Tie, en eŭropo, generacio post generacio, daŭre heredita estas la diferenco de klasoj, sekve malespera estas ĝia plibonigo.

Se vi legos novelojn skribitajn pri vulgara mondo, vi komprenos, ke en eŭropo ekonomiaj klasoj kiel kastoj en feŭda epoko de nia lando, okulfrappe sin prezentas en ĉiu flanko de socia kulturo. Sendube tie ne povas esti esperi pacigon de kapitalista klaso kaj laborista. Por senigi kontraŭaĵon inter la fortaj kaj malfortaj, la riĉaj kaj malriĉaj, necesas perforto samkiel la rusa revolucio, aŭ oni devas nevole konserve teni ĝisnunan staton per kontrolo simila en germanio kaj itatio.

En japanio ne sintrovas klasoj eŭropsimilaj. Sendube troviĝas riĉuloj, multaj malriĉuloj en japanio tamen ilia diferenco ne estas malgranda, sed tre malgranda, kompare al tio en eŭropo. La diferenco inter riĉo kaj malriĉo en eŭropo estas tro granda kaj jam tro malfrutempa por projekti egaligon de dividado de riĉaĵo. Nenia rimedo alia ol batalo de venko aŭ malvenko. Por efektiviĝi la projekton supre diritan de mi necesas eksterordinara rimedo; klasbatalo, batalo de malriĉaj kontraŭ riĉaj, batalo de laboristoj kontraŭ kapitalistoj. En japanio, dank' al

ekzisto de sociorda familio ne komparebla en la mondo, oni povas starigi kaj krei tielnomatan Ŝoŭa renovigo (revolucio) en paca procezo, sen turmenti popolon de revolucia rimedo russionila aŭ de perforta kontrolo simila al tiu de germanio kaj itatio, mi kredas.

Nu, mi havas firman kredon ke japanio povas krei kaj efektiviĝi utopion de paradizo, kie troviĝas nek riĉuloj, nek malriĉuloj kaj vivas popolo egale riĉa kaj egale feliĉa, per prosperigo de industrio kaj per familia sociordo, kiun posedas nur japanio, se ni klopodas unuanime per tia nova kapitalismo.

### Pri diktatora regado.

Dum mia vojaĝado, mi ofte legis en ĵurnalo pri levigo de voĉo sopiranta aŭtokratan regadon en japanio, kaj aperis en eksterlandaj ĵurnaloj supozo ke generalo Araki faros registaron kiel diktatoro ĉe 26, 2 afero, tamen mi profunde pensis ke en japanio neniam povas stariĝi diktatora regado, konsiderante popolojn eŭropajn kaj rusan.

Pri sovetrusio; krom ŝtatoficistoj de diplomataj aferoj, neniu estas permesata travojaĝi kaj observi eksterlandojn, kaj same neniu ĵurnalo kaj gazeto estas permesata enportiĝi el eksterlandoj, la ĵurnaloj kaj gazetoj kiuj estas permesataj al popolo legi, estas nenioj aliaj ol propagandaj eldonaĵoj farataj de la registaro, komunista partio, kaj ŝtataj entreprenoj. Verkaj kun permeso de la registaro. La popolo havas liberon nek de legado, nek de

parolo, pecon da nenia libereco. Tie diktatora regado estas daŭra, sekve de la specialeco de la nacianeco.

En germanio kaj itatio ankaŭ parola libereco kaj vivgarantio ne ekzistas, kaj eldoniĝas neniu gazeto kaj ĵurnalo alia ol propaganda informilo sub ordono de la registaro. Ĉiu estas perfortita silentadi tial ke kontraŭuloj de la regado ne estas garantiata eĉ sian vivon.

Kvankam torelaj kompare japanan popolon, la popoloj estas civilize edukitaj kaj iam posedis liberecon de parolado kaj ideo, tial mi ne scias ĝis kiam la diktatora regado povos daŭri tie. Vidante la procezon, tra kiu tia abnormalo formo de regado estas farata en la du civilizaj landoj, nome germanio kaj itatio, mi atentis ke tiaj statoj de la landoj neeviteble postulas tian formon de regado, pri kio ni, japanoj devas pripensi, mi pensas.

Inter ideoj de kontrolo ekonomio nun tre populare priparolataj, al mi odoras sopiro, aplaŭdo al diktatora regado kiel soveto, germanio kaj itatio, pri kio ni, japanoj prizorgu. Kaj mi sopiras kaj deziras rekonstrui la utopion de la paradizo, per senigo de kapitalismaj difektoj, per egaligo de profitdividado kaj per neniigo de diferenco inter la riĉaj kaj la malriĉaj.

\*Kobajaŝi-Iĉizo estas fama entreprenisto, kaj samtempe kapitalisto havanta rilatojn kun multaj entreprenoj, kino, teatro, elektro, k.t.p. Li lastan jaron faris mondvojaĝon, li verkis unu libron titolitan "Tio, Kio sekvas" en lingvo japana, ĝi enhavas multajn pensetojn de lia senkaŝa opinio.

La verko estas leginda kiel unu voĉo de entreprenistoj kiuj lastatempe iom kuraĝiĝis esprimi kontraŭemon kontraŭ ĉiam tamen pli kaj pli venkanta tendenco de japana faŝismo, iniciatita de militistaro de tiu ĉi lando.

## Al japanioj de nia gepatra lando

*Kobajaŝi-Iĉizo*

En eŭropo gejunuloj interamikiĝas tre libere kaj facile inter si, kaj memstare elekti sian edzon estas permesate al junulino.

Laŭ mia supozo, inter vi, japanioj estas multaj, kiuj sopiras ke ili, eŭropanoj povas vivi en tiel libera medio dum juneco.

Ankaŭ mi iom antaŭe pensis ke tiuj estas feliĉaj, kiuj povas decidi sian dumvivan kunulon post observo pri la karakterizo kaj medio de unu de alia en la libera socisistemo.

Travojaĝinte eŭropon, tamen mi sciigis ke neniam ili estas feliĉaj. Junaj virinoj ĉagreniĝas kaj estas

desdar 不規則 dar を見よ  
 dêsse de + êsse (其の) の短縮形  
 desse, es, e …… dar 接續法過去  
 單數  
 dêste de + êste (此の) の短縮形  
 deste dar 直説法過去二人稱單數  
 destrói destruir の直説法現在三  
 人稱及び命令法單數  
 deter 不規則 ter を見よ  
 detrair 不規則 sair を見よ  
 deu dar 直説法過去三人稱單數  
 dever + 動詞 …… せねばならぬ  
 ……するに違ひない  
 dezasseis 十六 ブラジルでは卑  
 語以外使はない  
 dezesseis 十六 ブラジルで用ふ  
 る正しい形 (dezessete 同様)  
 diga, as, a …… dizer 接續法現在  
 一, 二, 三, 人稱單數  
 digamos dizer 接續法現在一人  
 稱複數  
 digo dizer 直説法現在一人稱單  
 數  
 dirá dizer 直説法未來三人稱單數  
 dirão dizer 直説法未來三人稱複  
 數 「數  
 direi dizer 直説法未來一人稱單  
 diremos dizer 直説法未來一人稱  
 複數  
 diria, -ias, -ia …… dizer 條件法  
 現在  
 dirieis 條件法現在二人稱複數  
 dirigir 規則動詞  
 dirigir-se a alguém 或人に話し  
 に出かける  
 dirija, as, a …… dirigir の接續  
 法現在單數

dirijo dirigir 直説法現在一人稱  
 單數 「が三人稱單數  
 disse dizer 直説法過去一人稱及  
 disser, -res, -r …… dizer 接續法未  
 來 「過去  
 dissera, -as, -a …… dizer 直説法大  
 dissesse, es, e …… dizer 接續法過  
 去 「在一人稱單數  
 distingo distinguir の直説法現  
 distinga, as, a …… distinguir の接  
 續法現在  
 distrair 不規則 sair を見よ  
 dito dizer の過去分詞  
 Ditongo 二重母音 13  
 divertir 不規則, 後の表の下を  
 見よ 「ぶ  
 divertir-se 楽しむ, 面白がる, 遊  
 divirta, as, a …… divertir 接續法  
 現在 「稱單數  
 divirto divertir 直説法現在一人  
 diz dizer 直説法現在三人稱 及  
 (ブラジル) 命令法  
 Diz-se que …… (受身) …… が話  
 される, 云はれる, 噂される—  
 (主格は que ……)  
 Dizem que …… (無人稱動詞) ……  
 と云ふ話だ, を噂する, (主格  
 が不定)  
 dizer 不規則, 後の表を見よ  
 dizer bem com …… とよく調和  
 する  
 dize dizer 命令法單數 (ブラジル  
 では diz を用ふ)  
 同格接續詞 237  
 獨立文 248  
 dormir 不規則 後の表を見よ  
 dotar de …… を賦與する

南米ブラジルに發展し或は伯國と通商的, 文化的 交渉を持たれる

皆様の必讀書!!!

ブラジル法學士 友田金三著

# 標準ブラジル語

發音 會話 文法 譯讀

四六判 350頁 布製美本 定價 貳圓五十錢

「南アメリカの大國・ブラジルの國語は<sup>ポルトガル</sup>葡萄牙語である」云ふこ  
 こは今日誰でも知つてゐる處である。

しかし乍ら、ブラジルの葡語なるものは、ポルトガル國の葡語と全  
 然同一な譯では無く、實際に於て、かなり違つたものだ。云ふ事實  
 を認識してゐる日本人は實に少い。

一體我々日本人が葡語を學ぶ場合、十人の内九人迄 (或は十人が十  
 人共) ブラジルを目あてに勉強するのは分りきつたことであるに拘ら  
 ず、ホントにブラジルに即した葡語の學習書が今迄世に出ない云ふ  
 ことは、著者の誠に遺憾とする處である。

本書は 葡語、特にブラジルの葡語の發音、文法、會話、譯讀等の  
 大體の標準を、著者の經驗に基いて、正確に又なるべくわかり易く説  
 明したものである。尙念のために最初から注意して置きたいことは、  
 著者の云ふブラジル式葡語とはブラジルの智識階級や 社會一般が實  
 際に用ひてゐるブラジル特有のものを指し示すのである。

—「はしがき」より—

發行所  
 カニヤ書店

京都市寺町夷川上ル 電話上 2555 振替大阪 23404  
 東京市本所區龜澤町二ノ四 電話本所 2648, 1849



lacigitaj sub la libera geedziĝo.

En japanio, oni havas la kutimon ke la familio regas la vivadon kaj la geedzoj estas ĝia centro, kaj tamen ĝia familianoj ĝuas egale feliĉan vivon.

En eŭropo kaj usono, male tie regas individualismo kaj la geedzoj. Parolante pri amuzejo, oni ne trovas la puran lokon, kie gefratoj kune povas ĝui.

Mia surprizo estas ke preskaŭ ne sintrovas tia ludejo, kian la tuta familio kune povas partopreni.

Eduki idojn ĝis ilia memstariĝo estas sendube devo de gepatroj, tamen idoj ne heredas posedaĵon de gepatroj kaj gepatroj ne zorgas pri ilia profesio kaj geedziĝo.

Se la mastro de la familio mortus, ordinare lia edzino fariĝas ĉeffunebranto kaj la heredaĵo aparteniĝas al ŝi, sekve sociregule, idoj, estas edukitaj por esti memstaraj, vivoj memserĉas sian profesion kaj inoj memelektas sian edzon.

En edukado, tute ne estas distingite je viro kaj virino, tie la sistemo de koedukado kutimigas al gestudentoj amikiĝi inter si kaj ili aktive eniras inter virinojn ĉe junece tempo.

Ili iras kun viroj al tekunveno, muzika koncerto, danca kunveno, kinejo, teatro, k.t.p. Nur sole filinoj de supera socitavolo estas tiuj, kiuj interamikiĝas sub la prizorgo de la gepatroj, kaj aliaj filinoj de malsupra al meza socitavolo faras laŭ si liberan agadon.

Kiam oni aŭdas pri eŭropstila kutimo, tia vesto aŭ ĉi tia vesto ĉe la invitita manĝo, tiam oni supozus en eŭropo regas deca etiketo inter viro kaj virino, tamen, miaopinie, male, je la maldeca stato de virino kaj viro, mi estante japano miregis.

Ekzemple, kiam mi iris en manĝejon de la unuaranga hotelo ĉe la placo de *Konkordo* en parizo, ĉe ĉiu tablo, mi surprizigite vidis grizharulon kiel min, ampraparolanta kun junulino dudek kelkjaraga.

Ĉar rigardi ilin estas nedece, mi rekte marŝis al nia tablo senflankenrigarde. Tio estas natura kaj ordinara afero en eŭropo, tamen netolerebla scenejo al miaj okuloj, kies nacieco,

moralo kaj kutimo estas tute malsamaj.

Preskaŭ ĉiu el la gastoj estas el paro de geoj, kaj junulino estas ĉirkaŭprenanta sian viron kaj eksterliman intimecon montras. Eŭropanoj jam kutimigitaj al tio nenion sentus tamen tio estas nerigardebla al mi kun kutimo tute alia. Unu junulino rilatas tiel intime kun kelkaj viroj, kaj kune ĝuas la vivon por elekti sian edzon el ili, ŝia amo ne estas tiel pura kiel la amo de japana junulino.

Ofte okazas ke kelkaj junulinoj interbatalas inter si pro unu viro. Kaj krome, se ŝi havas la amanton, tio ne donas al ŝi trankvilon pro timo je la perdo de lia amo. Do eŭropa junulino, kiu devas esti hontema virgulino jam scipovas aman teknikon. Tie, en eŭropo ne ekzistas tia malĉastejo, kia en japanio, pro tio ĉiu junulino havas jam sperton similan al tiu de japana malĉasteja virino. Kun granda bedaŭro, mi aŭdis ke jam ne troviĝas virgulino inter junulinoj de meza socitavolo. Oni ne povas vidi infanecan senkulpecan ĉe eŭropaj virinoj. Jen la rakonto kiam mi estis sur la ŝipo Haruna, sur la revenvojo al hejmlando. Bela junulino 24a - aŭ - 5a jaraĝa estis en la 1a klaso de la ŝipo. Ŝi estis akompananta vartistinon kun sia infano.

Ŝajnis al mi ke ŝi estas sur la vojo al Hongkong, kie ŝia edzo loĝas. Baldaŭ ŝi interkonatiĝis tuj kun anglo, sika junulo kaj ofte kune venis en la manĝejon.

Dume, kiam la ŝipo alvenis Cejlonon, ankaŭ du junuloj ensipiĝis. La bela junulino de la 1a klaso ankaŭ tuj interamikiĝis, kaj jam ofte dancas kun la du. Kiam ŝipo atingis al Singapole, la junulino elŝipiĝis kun unu el ili, kaj ne revenas al la ŝipo.

La suĉigistino maltrankviliĝas, ĉirkaŭprenante la infanon. Fariĝas tre malfrunokte 12a horo, tempo baldaŭ forveturi, ŝi aperigis sian figuron kun la junulo ĉe forveturo.

Mi tute konsterniĝis, neniam japanoj ekvolus fari tiel, sendube ankaŭ la ĉirkaŭo ne permesas al ŝi fari tiel.

Tamen, male, riproĉi ŝin estas erare por eŭropanoj, tio estas ilia

kutimo, mi forte pensis pri la diferenco inter ilia morala ideo kaj mia.

Kie la bela edzino diboĉis kun la junulo, for de la kara suĉinfano, mi ne scias, tamen ŝi elŝipiĝis senhonte kun sia edzo, kiu venis al ŝipo por renkonti ŝin.

Vidante ĉi supran staton, mi profunde pripensis ke japanaj gejunuloj estas tre feliĉaj.

En japanio ĝisnuna kutima geedziĝo farita per intersanĝo de foto estas riproĉita de gejunuloj.

Miaopinie, tio ne estas malbona kutimo ĉar tio estas aranĝita tiel ke gepatroj, kiuj havas longtempan valoran sperton de geedzeca amo, preparas por la bono de sia filino plej feliĉan geedziĝon post enketado de medio, sango, personeco de la koncernito, kaj permesas al gekoncernitoj amikajn rilatojn por iom da tempo. Sendube sed maloftege estas, tiaj gepatroj kiuj perfortas politikan geedziĝon, precipe en japanio ne ekzistas gepatroj kiuj ĝojas je geedziĝo, kio plorigas sian filinon.

Mi opinias ke vere tre feliĉaj estas tiuj, kiuj ne bezonas serĉi sian edzon en sia juneco kaj povas akiri la bonan edzon, ĝuante sian junecon sub la amo de gepatroj. Kiam mi parolis al eŭropanoj pri la japana kutimo de geedziĝo, tiam ili treege enviis nin.

Tiuj, kiuj jam elĝuas amon intervirvirinan dum sia antaŭ-geedziĝo, kiel eŭropanoj, ne povas sciigi la vojon vivi en la bela absoluta amo de geedzeco, kiel japanoj povas.

Pro la manko de la vera geedzeca amo, ilia amo ne havos eternecon, sekve ankaŭ eksedziĝo estas farita pli simple kaj pli facile ol en japanio.

“Kuirajo de najbaro ŝajnas pli bongusta ol la propra” tamen se oni gustumas, la propra estas plej bongusta.

Elirinte el nia hejmlando mi eksciis veran bonon de ĉiu flanko de japanio.

Fine aperas

**Pri la rilatoj inter kemiaj strukturoj kaj fizologiaj agoj**

(Prezo 5.00enoj afrankite)

de *d-ro Takase*, imperia universitato en Sendai, en la bela esperanto de *T. Hattori*.

Librejo Kaniya

# VIRINA PAĜO

## Tradukado

*Fumiko Fukuhara*

Je tradukado plej grava estas fideleco al la originalo. Kio do estas fideleco? Pri tio estas multaj opinioj. Se oni opinias, ke tradukado signifas transiron, kaj ne estas alia krom transmeto, kiu transmetas unu peraĵon al alia peraĵo. Kaj en ĝia proceso la tradukanto devas aldoni nenian alfiksaĵon. Rosseti diris ke la laboro de la tradukanto estas laboro de sin-deteno. Estas prave! La tradukanto ne devas montri sin mem. La tradukanto devas pensi, ke la laboro ne estas sia, sed alia. Kaj al alia opinio la tradukanto estas nur perulo. Se la fideleco estas tiu, kiu klopodas por trovi similecon de esprimo de du diferencaj lingvoj, tradukado devas esti facila laboro por lingvisto. Se oni tradukas ekzakte kaj ekzakte, sekvas ridinda imitado. Laŭvorta traduko ofte signifas sensencan fidelecon.

La laŭvorta traduko povas helpi komprenon al la originalo, sed ne povas anstataŭigi. La anstataŭaĵo devas esti ŝanĝita la eksterveston, sed havi la saman internon. Sed je la ŝanĝo de vestoj oni faras tre ofte kaprican senpripensan aĵon. Kiam oni devas vestigi verdan aĵon, oni vestigas ruĝan. Kaj kiam devas vestigi gajan, melankolian, pro tio ke ili ne pripensas pri ĝia interno. Ni tre bone scias, ke estas multe da netaŭgaj tradukaĵoj de Shakespeare, Dickens kaj aliaj.

Alia opinio pri la fideleco de la tradukado estas ke ne estas la fideleco al vortoj de la originalo, sed estas al spirito de la originalo. Tradukanto ne devas traduki vortojn kaj paraĝojn k. frazojn, sed devas kapti ideon kaj senton. Ĉar ĝia spirito estas sama kaj ĝia korpo ŝanĝiĝas, la traduko estas unu metempoko.

La tradukanto devas ekzakte kapti sencan de la vortoj kaj ĝian tutan tonon. Kaj poste ni devas ek trovi alian lingvon, kiu estas plej egala por

artvaloro, kiun havas la originala vorto. Eĉ se en la tradukaĵo troviĝas gramatikaj eraroj, ĝi estas pli valora, merita ol tiu, kiu erare kaptas la spiriton, malgraŭ ke en ĝi estas gramatikaj eraroj, se oni bone kaptas spiriton de la originalo kaj esprimas ĝian tonon.

Se en tradukaĵo aperas gaja sento, malgraŭ ke en la originalo estas malgaja, melankolia sentoj, tio estas pereiga difekto. Kaj eraroj de prepozicioj kaj kutime uzataj frazoj estas permesindaj. (Fino)

## Mateno

*Hara-R.*

En granda kaj nova konstruaĵo, la interno estas tre bone ordigita, sed ĝi estas tute fremda por mi. Tamen ŝajne mi devas labori ĉi tie de hodiaŭ. Por min prepari por matenmanĝo, unue mi estas iranta al mia privata ĉambro. Mi devas rapidi, alie malfruigos al matena kulto. Sed kie estas la ĉambro? Jen supren jen malsupren mi rapidete iras kaj revenas en la koridoro. Sed strange! Nenie troviĝas laŭŝajne privata ĉambro. Fine mi malfermis la pordon de iu ĉambro. Ho, malsanulejo: En la lito kuŝas kaduka maljunulino. "Pardonon" salutante mi fermis la pordon trankvile. Sekve mi kuris antaŭen kaj flankentiris la kurtenon. Ho, ankaŭ ĉi tie estas lito kaj sur la lito sidas ja tute bela kaj juna blondulino. Mi devas turni min malantaŭen.

Ĝuste tiam venis konata alilandana kuracisto. "Doktoro, kie estas mia ĉambro?" "Ha, via? Estas tie." Li respondis fingromontrante. "Dankon" kiam mi diris la vorton, tiam mi vekiĝis el sonĝo.

En la ĉambro jam estas tute hele kaj horloĝo montras ĝuste la sesan. Tra la fenestro plene malfermita, enblovas agrabla venteto. Birdetoj ankaŭ gaje pepadas en la ĝardeno.

Hodiaŭ estas sabato kaj mi povas resti en la lito ĝis la deka, kaj tial mia koro fariĝas trankvila. Mi denove fermis la okulojn por postkuri la sonĝon, sed jam vane!

De malproksime aŭdiĝas knarado

de tramoj kaj akra fajfado de fabrikejo.

## La pupo babilemas.

### Madrido falinta ankoraŭ ne falis

Jam ĉe la komenco de la civila milito en Hispanujo la japanaj ĵurnaloj informis preskaŭ senescepte, ke Madrido estas falonta aŭ ke Madrido jam falis. Pasis semajnoj, monatoj kaj monatoj, kaj la urbo ankoraŭ troviĝas en la mano de la registaro. Tio povas montri, ke Japanujo aŭ la reganta faŝismo ĝojas la falon de la nuna registaro de Hispanujo. Tamen pli vere estas, ke nunaj ĵurnaloj aĉetas la informojn de la novaĵoj de iu firmo en eksterlando kaj la vojo, per kiu la informoj venos estas treege limigita. Estis feliĉe, ke la esperantistaro ricevis la informan bultenon rekte de la batal-kampo kaj de la ĉirkaŭaĵoj mem kaj ĉiam povis sciigi la veron.

Laŭ la informo, la italaj kaj germanoj volontuloj (ĉu vere laŭlitere volontuloj?), kiuj nombras kelkajn milojn, surteriĝis ĉe Cádiz kaj aliloke por helpi la riberan armeon. Estas eraro, se oni pensas, ke la faŝismaj landoj volas helpi la hispanan faŝismon. Kiel la lasta numero de UŜE-EŬO prave diris, ne troviĝas la ligilo inter la faŝismaj landoj kontraŭe al la maldekstraj landoj. La landoj kompreneble provas semi sian intereson en Hispanujon. Kaj cetere Germanujo provas iel fari per tio profiton por la reakiro de la perditaj kolonioj, kiuj devos esti dividitaj *juste* (kvankam *juste* dividi signifas redoni al ĉiuj rasoj, t. e. perdi).

### Laŭleĝe deviga teksto japanlingva

一部金拾錢 (送料五厘)  
定價 一年送料共金壹圓貳拾錢

昭和12年1月15日印刷  
昭和12年1月25日發行

TEMPO 編輯, 發行者 中原 脩 司  
京都市寺町夷川上ル常盤木町 46

印刷者及 仙臺市國分町 88 番地 笹氣印刷所  
印刷所 國際時事新聞社 京都市寺町夷川  
發行所 電話上 2555 振替大阪 41036, 23404

Estimataj Gesinjoroj,

Ni havas honoron prezenti al vi la gazeton "TEMPO" kiel specimeno, kiu estas eldonita de nara lando Japanujo.

Ĝi aperas ĉiumonate, kaj skribas pri diversaj temoj en la Mondo.

"TEMPO" estas sola internacia gazeto en Japanujo.

Vi gesinjoroj nepre plaĉus ĝin, kaj ni atendas vian baldaŭan abonon.

Altestime,

*Nakahara-S*

Administranto de "TEMPO"  
Librejo Kaniya: Teramati  
Ebisugawa, Kioto, Japanujo

P.s.

Per la poŝtmandato estas la plej taŭga rimedo por abonpago.